



ELNA-BULTENO

ESPERANTO-LIGO POR NORDA AMERIKO

Numero 18 (73)

Februaro 1973

Novaja Redaktoro: Erik J. Felker
731 Birmingham Road, Burbank, CA 91504

Literatura Redaktoro: Charles R. L. Power
1014 Weymouth Avenue, San Pedro, CA 90732



Universala Kongreso en Beograd

28 Julio--4 Aŭgusto 1973

Alta Protektanto: Prezidanto de
Jugoslavio, Josip Broz Tito

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg
176, Rotterdam 3002, Nederlando

Sespaĝa, grandformata kaj ilustrita
bulteno de la 58-a UK kaj la aliĝilo
estas senpage riceveblaj de la usona
ĉefdelegito, Armin F. Doneis, P. O.
Box 105, Pharr, TX 78577.

13-a Internacia Infana Kongreseto

La infankongreseto okazos en
"Pionira Urbo" de Beograd de sabato
la 28-a de Julio ĝis sabato la 4-a
de Aŭgusto 1973. Ĝi estas rezervita
al infanoj de 6 ĝis 13 jaroj, kies
lingvoscio ebligas sekvi la
programon gvidatan tute en
Esperanto. Partopreno estas
limigita je 160 lokoj. Aliĝiloj
estas senpage riceveblaj ĉe la
kongresa adreso.

Kongresa glumarko

Mendojn por la kongresa glumarko
akceptas Esperanto Information
Center, P. O. Box 508, Burlingame,
CA 94010.

29-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO

La jarkongreso de la junulara sekcio
de UEA (TEJO) okazos en Saravejo,
Jugoslavio, de la 21-a ĝis la 27-a
de Julio 1973. Adreso de la
organiza komitato: 29-a IJK, V.
Polagica 8/1, YU-71000 Saravejo,
Jugoslavio.

Oficiala Postkongreso

La oficiala postkongreso de la 58-a
UK okazos de la 5-a ĝis la 12-a de
Aŭgusto 1973 en Ateno, Grekujo.

Beograd en koloroj

Faldfolion en Esperanto pri la
kongresurbo jam eldonis la Turista
Oficejo de Beograd. Interesiĝantoj
bonvolu skribi al: 58-a UK de
Esperanto, Terazije 42, YU-11000
Beograd, Jugoslavio.

Kongres-kotizoj en dolaroj

1. Kongresano ne membro individua de
UEA \$34.80 ĝis 73.03.31, \$38.00 ĝis
73.06.20
2. Kongresano individua membro de
UEA kun Jarlibro (MJ) \$29.50 ĝis
73.03.31, \$32.60 ĝis 73.06.20
3. Kongresano individua membro de
UEA kun Jarlibro kaj revuo Esperanto
(MA) \$24.20 ĝis 73.03.31, \$27.40 ĝis
73.06.20
4. Edz(in)o de Kongresano en
kategorio (1) \$24.30 ĝis 73.03.31,
\$26.60 ĝis 73.06.20

novaĵoj el Usono

5. Edz(in)o de Kongresano en kategorio (2) aŭ (3) \$20.20 ĝis 73.03.31, \$22.20 ĝis 73.06.20
6. Junulo ĝis inkl. 20-jara \$10.40 ĝis 73.03.31, \$11.40 ĝis 73.06.20
7. Universitata studento ĝis inkl. 30-jara \$17.40 ĝis 73.03.31, \$18.90 ĝis 73.06.20
8. Blindulo \$13.90 ĝis 73.03.31, \$15.20 ĝis 73.06.20

Esperanto kaj turismo

La internacia turismo estas unu el la maturaj kaj fekundaj terenoj por la aplikado de Esperanto. Pri la suferado pro lingvaj problemoj flanke de multaj turistoj ĉiujare jam scias Esperantistoj. Por mondscale unuigi, kunordigi kaj direkti la solvon de tiu problemo per Esperanto fondiĝis la asocio Monda Esperanto-Turismo (MET).

MET planas kaj organizas proprajn turismajn aranĝojn, eldonadon de turismaj presaĵoj, organizadon de Esperanto-kursoj por turistoj kaj oficistoj kiuj deĵoras en la sfero de turismo, kaj similajn aferojn.

Por pli da informoj, turnu vin al la ĝenerala sekretario, Nik. Nikolov, P. K. 45, Sofio-C, Bulgarujo. La gvidantaro de MET estas diversnacia.

MET nun planas vojaĝojn ktp. por 1973. Informiĝu!

Alvoko de Hanojo

La prezidanto de la Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, Nguyễn Van Kinh, kaj ĝia ĝenerala sekretario, Đào Anh Kha, petas, ke oni bonvolu helpi al la tiea movado per donaco de Esperantaj libroj al la Hanoja Internacia Biblioteko. Oni sendu la librojn aŭ al VPEA, 68 Ly thuong kiêt, Hanojo, Vjetnama Demokratia Respubliko, aŭ al s-ro W. Keable, 60 Redman House, Portpool Lane, London EC 1, Anglujo.

Noto de la redakcio

Elkore la redakcio dankas al tiuj, kiuj skribe reagis al la artikoloj en ELNA-Bulteno. Viaj opinioj helpas nin fari pli bonan, pli utilan bultenon. Do al tiuj, kiuj jam skribis, ni dankas; al tiuj, kiuj ankoraŭ ne skribis, sed jam decidis tion fari, ni antaŭdankas!

Sed ne limigu vin al reagoj. Kontribuaĵojn ni ankaŭ bezonas. Nia ĉeftemo estas Esperanto-novaĵoj kaj literaturaj aferoj, sed ankaŭ gravas informoj kaj opinioj pri lingvaj problemoj, komunikaj problemoj, vortludoj kaj aliaj lingvo-rilataj aferoj. ELNA iĝu pli bona komunikilo per via komunikemo!

Lastmomente ni ricevis leteron de d-ro E. James Lieberman, prezidanto de ELNA. Interalie, li skribis, "...mi esperas ke vi povos aktivigi la anojn de ELNA... kontribui artikolojn, tradukojn, recenzojn, prozaĵojn, poemojn, ĝis kiam vi krios, 'sufiĉe!' Mi proponas tiucele ke ELNA donu premion ĉiujare por almenaŭ tri kontribuaĵoj elektitaj pere de elstara komitato el membroj kiuj jam internacie koniĝis." Pli da informoj sekvos!

Cu vi aŭdos

kamel-sonoriletojn dum la ELNA-karavano al Beogrado? Ne, pro tio, ke gi estos aviadila karavano! Kio, do, estos tiu tintado? Ŝparita mono ĝi estos, por pliagrablighi la restaĵon de via vojaĝo!

Por pli da informoj, skribu tuj al Esperanto Information Center, P. O. Box 508, Burlingame, CA 94010.

Esperanto-Seminario ĉe MLA, Novjorko
(speciala raporto de d-ro R.E. Wood)

Responde al petskribo, kiun subskribis proksimume tridek usonaj kaj kanadaj profesoroj pri lingvo kaj literaturo, seminario pri la temo "Esperantaj Lingvo kaj Literaturo: Interlingvistiko" okazis kiel parto de la 87-a Ĉiujara Kunveno de la Asocio pri Modernaj Lingvoj (MLA) ĉe la Hotelo New York Hilton, la 27-an de Decembro 1972.

La diskutestro estis prof. Pierre L. Ullman (Universitato Wisconsin, Milwaukee). Referaĵojn prezentis la jenaj:

Prof. Howard P. French (Univ. Southern Illinois, Carbondale): "Esperanto kaj akademia respondeco".

D-ino Margaret G. Hagler (Kolegio Lincoln Land, Springfield, Illinois): "Esperanto kiel perilo de poezio".

D-ro William A. Solzbacher (Voĉo de Ameriko, Vaŝingtono): "La uzo de Esperanto ĉe internaciaj sciencaj kongresoj: Faktoj, problemoj kaj celoj".

Prof. Richard E. Wood (Ŝtata Univ. Louisiana, Baton Rouge): "Piĝinaj kaj kreolaj lingvoj: ilia signifo por interlingvistiko".

Prof. Julius Balbin (Kolegio Graflando Essex, Newark, New Jersey), "Ĉu Esperanto estas latinida lingvo?"

Prof. John F. Gadway (Univ. Southern Illinois, Carbondale), "Esperanto kaj la krizo en fremdlingva edukado".

Salutmesaĝojn oni legis de du kleruloj konataj pro sia laboro sur la kampo de interlingvistiko kaj sia rekomendo de Esperanto kiel solvo al la mondaj lingvaj problemoj: d-ro Mario Pei (emerita profesoro, Univ. Columbia) kaj d-ro Norman A. McQuown (Univ. Chicago).

Inter la plej konataj kleruloj, kiuj ceestis la seminarion, estas prof-oj John Algeo (Univ. Georgia), Jacob Ornstein (Univ. Texas, El Paso), Humphrey Tonkin (Univ.

Pennsylvania) kaj Albert Valdman (Univ. Indiana). Geinstruistoj ĉe baznivela kaj meznivela lernejoj ankaŭ estis aktivaj partoprenantoj en la diskutado.

Responde al sugesto de prof. Ornstein, oni voĉdonis peti la Asocion, ke ĝi organizu du apartajn seminariojn por la venonta kunveno, kiu okazos en Ĉikago de la 27-a ĝis la 30-a de Decembro 1973. Prof. Carlton Carroll (Univ. Wisconsin, Madison) estros la unuan, kiu estos denove "Esperantaj Lingvo kaj Literaturo". Prof. Richard E. Wood estros la duan, "Interlingvistiko", kiu aparte okupiĝos pri la temo "Sociolingvistikaj kaj Kulturaj Konsekvencoj de la Estiĝo de Internacia Lingvo".

Oni petas, ke anoj de MLA kiuj volas partopreni unu aŭ la alian seminarion aŭ iniciati diskutadon pri iu ajn temo bonvolu tuj kontakti la respektivan diskutestron.

ELNA-Kongreso, 1973

La ELNA-Kongreso por 1973 okazos tuj antaŭ la foriro al Beograd, posttagmeze la 26-an de Julio, en Novjorko, ĉe la flughaveno Kennedy. Detaloj sekvos poste, kiam la rondvojaĝa plano estos preta.

Kongresa multiĝo

Pro la multkosteco de usonaj kongresoj, ELNA intencas stimuli ankaŭ diversajn regionajn kunvenojn, kaj starigi ne nur la supre menciitan oficialan landan kongreson antaŭ la UK, sed ankaŭ alian apud la kunveno de Modern Languages Association en Ĉikago (73.12.26-29). Tamen rezoluciojn, proponojn ktp. por oficiala diskutado en Julio oni sendu nun al nia prezidanto, E. James Lieberman, M. D., 6451 Barnaby Street, Washington, D. C. 20015.

#####

Propagandiloj de gemembroj

Du artikoloj pri Esperanto aperis antaŭnelonge en malgrandaj usonaj revuoj. Ambaŭ verkintoj estas ELNA-anoj, kaj ambaŭ penis vekti intereson ĉe grupoj, kiuj povas uzi kaj ĝui la lingvon.

S-ro Lawrence A. Ware, sekretario de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto, verkis artikolon por Lone Indian Magazine. Li priskribas, kiel geemerituloj povas uzi Esperanton por plivigli kaj pliinteresiĝi postemeritigajn jarojn. S-ro Ware mencias la facilecon de nia lingvo, klarigas, ke oni povas ĝin lerni rapide, kaj plue, ke pere de ĝi oni povas iom lerni pri la angla gramatiko. Li ankaŭ priskribas, kiel Esperanto povas kreskigi la intelektan vivon, igi vojaĝadon pli alloga, kaj plenigi horojn, kiuj sen tio eble estus enuaj. La tono de la artikolo estas ĝoja kaj pozitiva, do amikeca. Oni tamen iom bedaŭras, ke s-ro Ware ne klarigas, ke la lingvo ekzistas ne nur por individua plezuro, sed celas rolon en la plibonigado de la tutmonda situacio, kie ajn ĝenas la lingva problemo.

La alia artikolo, kiun verkis s-ino Eleanor Stein, aperis en Joyer Travel Report. Tiu revuo starigis konkurson pri "plej ŝatataj vojaĝrilataj bonaĉetoj". La "bonaĉeto" kiun s-ino Stein sagace elektis estis (kiel vi eble jam divenis!) Esperanto. Tion ŝi klarigas per informo, ke Esperanto helpas al la vojaĝanto interkonatiĝi kun personoj en aliaj landoj, kaj ĝui ne nur pli riĉan vojaĝon laŭ kulturaj valoroj, sed fakte ankaŭ pli finance elteneblan, pro tio, ke lokaj samideanoj povas informi pri malaltprezaj hoteloj, restoracioj, ktp. La korvarmigaj travivaĵoj, kiujn ges-roj Stein ĝuis pere de Esperanto dum siaj vojaĝoj respeguliĝas en la intima tono de la artikolo.

Ambaŭ artikoloj estas valoraj propagandiloj, kaj la geverkintoj faris bonegan servon por Esperanto.

Ec pli pri efika informado!

Senlaca kaj celtrafa agemulo Thomas Goodman de Baltimore, Maryland, denove trafis la celon per artikolo en Extra, bildgazeta sekcio de la grava ĵurnalo Baltimore Sun. La artikolo bone priskribas bazajn faktojn pri la lingvo internacia.

Bultenoj! Bultenoj!

La novaĵa redaktoro ankoraŭ petas ekzemplerojn de lokaj aŭ ŝtataj bultenoj, celante diskonigi la plej bonajn ideojn en ili al aliaj grupoj.

Ĉi-monate ni ricevis la bultenon de la Esperanto-Societo de Chicago, kies kunveno inkluzivis, post parolado al la tuta grupo, disigon en du partojn: unu por anglalingva klarigo pri Esperanto, la alia por konversacio en tiu lingvo.

Aparte notinda estas la bela kaj atentokapta afiŝo (8½ x 11½ coloroj) pri Esperanto, kiun ni ricevis de ESC. Eble via klubo aŭ vi mem volos skribi al s-ro Kent Jones, 3318 N. Lake Shore Drive, Apt. 403, Chicago, IL 60657, por ekscii, ĉu li permesos, ke via loka grupo ankaŭ uzu ĝin. Oni povas meti informon pri sia grupo sur ĝin.

Ni gratulas!

S-ro Julius Balbin, usonano, ricevis la unuan premion por tradukita poezio ĉe la Belartaj Konkursoj de 1972. La poemo, kiun li tradukis, titoliĝas "Sankta Francisko kaj la povraj judoj". La originalo, de Józef Wittlin (poldevena usonano, 1896-), estis verkita en la pola.

La redakcio pardonpetas

al tiuj, kiuj ne ricevis la lastan numeron de ELNA-Bulteno. Venis multaj petoj por ĝi, do ne eblis sendi duan ekzempleron al tiuj, kiuj transloĝiĝis sed ne sendis al ni la novan adreson, aŭ sendis ĝin post la farado de la adres-etikedoj. Por ke tiu situacio ne ripetiĝu, oni petis ĉi-numere pli da ekzempleroj ĉe la presisto.

Afrikaj artaĵoj

Grava ekspozicio de afrikaj artaĵoj prezentigos ĉe Los Angeles County Museum of Art, Los Angeles, CA (20 Marto--31 Majo); M. H. de Young Memorial Museum, San Francisco, CA (2 Julio--31 Aŭgusto); kaj Cleveland Museum of Art, Cleveland, OH (2 Oktobro--2 Decembro). Jen okazo por vidi gravajn erojn de la tutmonda kulturo.

Seymour Halpern, novjorka parlamentano, atentigis

al la nacia deputitaro (House of Representatives), ke "hodiaŭ Esperanto estas parolata por... pragmatismaj celoj, nome por akceli pli grandan internacian kunlaboron en fakoj kiel turismo, komerco, diplomatio kaj scienca komunikado."

Parlamentano Halpern finis per laŭvorta citado de la tuta artikolo pri Esperanto aperinta en New York Times okaze de la Universala Kongreso en Portland.

Ĉu vi scias la opinion

de la politikistoj, kiuj reprezentas vin loke, ŝtate kaj nacie pri lingvoproblemoj? Nuntempe en pluraj lokoj en Usono oni elspezas grandajn monsumojn por dulingva edukado kaj edukado de kulturaj malplimulto. Kion opinias viaj deputitoj pri tiuj programoj? Ĉu ili komprenas, ke la lingvo internacia povus helpi al solvo de lingvaj problemoj?

Vi povas trafe informi ilin pri la situacio ĉe vi, kaj kiel Esperanto povus helpi rilate al lingvokulturaj problemoj.

Praktika servo al la estonteco de Esperanto en Usono estus amasa skribado de leteroj mallongaj kaj bone pripensitaj por informi la politikistojn pri nia lingvo kaj la rolo, kiun ĝi meritas en nuntempa edukado.

En Britujo, oni jam organizis veran esperantistan premgrupon (Esperanto Lobby). Imitinda ekzemplo, ĉu ne?

(reklamo)

Esperanta Monata Ilustrita

Specimeno akirebla senpage

EL POPOLA ĈINIO

ABONTARIFO: 1 jaro \$2.00
2 jaroj \$3.00
3 jaroj \$4.00

ABONU: ĉe Esperanto Book Service
P. O. Box 508
Burlingame, CA 94010



Grava lingva afero

en Usono, kiu supozeble interesos Esperantistojn, estas esplorado de la negra dialekto de la usonangla. J. L. Dillard, profesoro pri lingvistiko ĉe Universitato Puerto Rico, kredas, rezulte de sia analizo de sintakso de la usona negra parolmaniero, ke la bazo de la dialekto troviĝas en okcidenta Afriko. La dialekto aktuala estas fakte la restaĵo de piĝina lingvo, kiu kreiĝis dum la sklavkomercado.

Rilate al la eduko de la geinfanoj, kiuj parolas tiun dialekton, Dillard esprimas deziron, ke la lingva parto de ekzamenoj pri inteligenteco por ili baziĝu sur kompreno kaj uzado de la "negra" angla, kaj ne de la generale uzata usonangla, kaj ke la komencaj legolibroj estu en la negra dialekto, por ke la geinfanoj ne devu lerni novan dialekton kaj legadon samtempe.

Esperanto en Meksiko

Tiuj, kiuj volas studi Esperanton en Meksiko dum la somero ĉe la Universitato Durango, skribu al d-ro J. Ninahualpa Lucano, P. O. Box 2662, Spokane, WA 99220.

Gazetojn alilandajn

diverstemajn havas s-ro Conrad Fisher, R. F. D. #1, Meadville, PA 16335. Li pruntos ilin al interesitoj kontraŭ afranko.

Ni gojas raportoj

ke konata samideano Glenn P. Turner, direktoro de Esperanto Library, kiu dum pluraj jaroj estis la sola libroservo de ELNA, jam resaniĝas bone post grava operacio. Li nun daŭrigas sian esperantistan agadon helpate de siaj filino kaj bofilo.

Ce UNA-USA

Du elstaraj aktivuloj de ELNA partoprenis la konferencon de la usona filio de la Asocio pri Unuiĝintaj Nacioj (31 Januaro--3 Februaro 1973). Ili faris jenan

proponon: "Tiu ĉi revolucio necesigas internacian lingvon, kaj ni petas enketon pri internacia lingvo kiel Esperanto por multe pligrandigi reciprokajn komprenon kaj estimon inter la tri miliardoj de niaj samplanedanoj." En la publika diskuto eksdiplomato Charles Yost, sen ataki Esperanton, diris, ke tio ne estus nun oportuna, sed triono de la partoprenantoj (cent el tricent) voĉdonis favore.

Cu vi serĉas korespondamikon?

Multaj Esperantistoj volas korespondi kun usonanoj. Ili havas diversajn interesojn, aĝojn, edukajn nivelojn, postenojn, ktp, sed ili ĉiuj volas scii pri vi kaj via lando.

Korespondado ne nur estas agrabla travivaĵo, sed ankaŭ donas bonan okazon por praktikado de Esperanto laŭ "senlarma" metodo.

Cu vi interesiĝas, sed ne havas korespondamik(in)on? Tio estas facile solvebla problemo! Skribu al f-ino Ellen Lewis, Estrino de Koresponda Servo, 15 Salisbury Rd., Brookline, MA 02146, dirante al ŝi iom pri vi mem kaj pri tio, kian personon vi serĉas. Vi ricevos de ŝi plurajn nomojn kun informo pri ĉiu, por ke vi komencu vian amikecon per korespondado.

Oni ofte havas plej bonan sukceson per skribo al pli ol unu persono, eĉ kiam oni deziras nur unu korespondamikon. Tiel, kiam vi ricevos la respondojn, vi povos elekti la plej taŭgan kaj informi la aliajn, ke vi jam elektis por vi korespondamikon.

Deziras korespondi

S-ro Štepan Turčinek, Husova 470, Vitkova, okres Opava, 74901, Ĉeĥoslovakio, volas interŝanĝi bildkartojn kaj poŝtmarkojn kun usonanoj.

S-ro Helmut Senger, Fahnstrasse 29, Welzow, DDR 7533, Germanujo, volas korespondi angle kaj esperante pri Mormonismo.

Por la komencantoj

(Ĉi tiun dum pasintaj monatoj neglektitan rubrikon restarigas fragmento de la novelo "Unu paĝeto en mia lerneja vivo" de la hodiaŭ ne suface konata sed siatempe fama blinda esperantisto Vasiliĵ Eroŝenko (1890-1952).)

La instruisto diris al ni ke homoj estas dividitaj en rasoj: la blanka, la flava, la ruĝa, la nigra k. t. p. La plej civilizita kaj progresema raso estas la blanka, la malplej civilizitaj estas la nigra kaj la ruĝa.

Lapin ekstaris kaj demandis: "Ĉu ni estas la plej civilizitaj kaj progresemaj pro nia blanka koloro?" Alia knabo ekstaris kaj demandis: "Kiam dum somero oni nigriĝas pro la suno, cu oni ankaŭ malciviliziĝas pro tio?" La instruisto diris ke ambaŭ demandoj estas malsaĝaj, kaj Lapin kaj la alia knabo devis stari ĝis ili komprenis sian malsaĝecon.

Apub nia lernejo troviĝis la domo de S-ro Perlof. S-ro Perlof estis la estro de la plej fama rusa tekompagnio en Ĉinio, kiu enportas en Rusion la teon en grandaj kvantoj el Ĉinio. Unu fojon S-ro Perlof invitis al sia hejmo la faman ĉinan diplomaton Li Hung-ĉang. S-ro Li, eksciinte ke nia lernejo troviĝas tute proksime de la domo de S-ro Perlof, ekvolis nepre viziti gin. S-ro Li Hung-ĉang venis al nia lernejo en sia ĉina vesto, kun harligo sur la kapo. Li estis tre afabla kaj permesis al ni tuŝi lian veston kaj la harligon ankaŭ.

Sciinte ke S-ro Li Hung-ĉang apartenas al la flava raso, mi kaptis lian manon kaj per palpo penis trovi la diferencon inter la blanka kaj flava koloroj. Post kelkaj minutoj mi demandis al la instruisto: "Cu S-ro Li estas vere flava homo?" La instruisto diris jes.

"Sed mi ne povas trovi ian diferencon inter la blanka mano kaj la flava."

Lapin aldonis: "Se S-ro Li apartenas al la flava raso, certe li devas esti malpli civilizita ol ni, sed al mi ŝajnas ke li estas almenaŭ pli afabla ol nia Miĥail." (Miĥail estis nia servisto kiun ni tre malsatas pro lia malĝentileco.) La interpretisto diris ion al S-ro Li, kaj li multe ridis, sed post lia foriro mi kaj Lapin estis punitaj pro la malĝentileco al la fremda gasto. Oni permesis al ni nenion manĝi, ĝis ni estis komprenintaj nian malĝentilecon. En la fino de la sama tago ni komprenis tion ĉi kaj estis permesitaj iri kun aliaj por vespermanĝo.

Survoje al la manĝejo mi diris mallaŭte klininte min al Lapin, ke la manoj de l' flava S-ro Li Hung-ĉang estis pli agrablaj por tuŝi ol la manoj de nia blanka direktoro. Lapin diris al mi ankaŭ en mallaŭta voco, ke li pensas ke S-ro Li Hung-ĉang estas ne nur pli afabla ol nia Miĥail sed ankaŭ pli civilizita ol niaj blankaj instruistoj.

En la manĝejo nia instruisto ordonis al mi kaj Lapin stariĝi kaj demandis: "Nun, do diru antaŭ ĉiuj, pri kio vi murmuris irante tien ĉi?" Elpensi mensogon rapide ni ankoraŭ ne povis tiam kaj balbutante timeme ni diris ĉion. La instruisto tre koleriĝis, li ordonis al ni stariĝi sur malvarma ŝtona planko, kaj diris ke li ne permesos al ni leviĝi ĝis ni komprenos klare niajn erarojn.

(Por plenigi la paĝon ni nun donas kelkajn juvelojn de la vira ŝovinismo el nia kara Proverbaro Esperanta. Emancipistinoj ne legu plu!)

Kie regas virino, malbona estas la fino. Se edzino ordonas, domo ordon ne konas.

Ne spiciĝas manĝo de mastrina beleco. Edzin' admirata--edzo malsata. Virino scias--tuta mondo scias.

Kie diablo ne povas, tien virinon li ŝovas.

Ni komencu klopodi en la lernejoj!

Thomas H. Goodman

(tradukita de parolado en Tostmajstro-Klubo n-ro 2884 ĉe la centra oficejo de la Administrado de Sociala Asekuro, Baltimore, la 15an de majo 1972)

Eble vi memoras kelkajn el miaj antaŭaj paroladoj en nia Tostmajstro-Klubo. La ĉefaj ideoj esprimiĝis en la titoloj: "La tero bezonas internacian lingvon" kaj "La dialektiko pri Esperanto". Mi ne intencas konvinki tiujn, kiuj ne interesiĝis, efektivi la agplanon kiun mi proponas hodiaŭ. Al la aliaj, tamen, kiuj kredis, ke Esperanto bone solvos la mondan lingvan problemon, kaj scivolis, kiel ĝin antaŭenigi, mi nun rekomendas unuan agplanon: ni komencu klopodi en la lernejoj. Ĉi tiu agado helpas kaj la progreson de Esperanto kaj la lernantojn. Ni komprenu kial.

Rilate la helpon al la progreso de Esperanto, eble la fakto ke la instruado de Esperanto en la lernejoj antaŭenigos ĝin estas tiom memevidenta, ke la demando devus esti: "Kial en la lernejoj pli ol aliloke?" Vi povas vidi, ke oni plejparte lernas lingvon en lernejo--kiel devigan studobjekton pli ol kiel bezonatan kapablon. Escepte de kelkaj turistoj au komercistoj, kiuj serĉas rapidkursojn ĉe Berlitz, kaj kelkaj personoj, kiuj ŝatas legi gramatikajn lernolibrojn, oni tre malofte lernas iun ajn lingvon post la aĝo de dudek jaroj. Ne nur pro tio, ke oni devas plenumi tro da fendaĵoj, sed ankaŭ oni psikologie ne sufiĉe pretas lerni novan, kaj kelkfoje malfacilan, studobjekton. (Kiam mi instruis la francan lingvon, mi vidis, ke la plejparto de la plenkreskuloj tute ne scias efike lerni alian lingvon.) Laste mi diru, ke la publika lernejarro (kaj ankaŭ multaj privataj lernejoj) povus esti subjekto de eksperimento sen granda malprofito al la lernantoj.

Rilate la helpon al la lernantoj, mi nun precizigas mian planon: ĉiu lernanto en publika liceo kiu intencas studi fremdan lingvon studos Esperanton dum la duonjaro antaŭ la komenco de studo de la alia lingvo. Ni iom ekzamenas kiel ĉi tiu plano helpas la lernanton kaj, parenteze, la administradon de fremdaj lingvoj en liceo. Esperanto estas logika lingvo, kiu ne havas gramatikajn au prononcajn esceptojn. La regularo estas tiel malgranda, ke eĉ post duonjaro oni povas esprimi sin per Esperanto multe pli bone ol per iu ajn alia fremda lingvo. Do se la lernanto havas almenaŭ mezkvalitan ĝeneralan lernkapablon, li lernos pensi rekte en Esperanto. Se li poste studos alian lingvon, li estos jam farinta unuan grandan paŝon--kaj la lernado de la ortografiaj aŭ prononcaj malfacilaĵoj aŭ la gramatikaj neregulaĵoj de la alia lingvo, kvankam ĝi postulos pli da tempo ol ĉe Esperanto, ne plu estos la preskaŭ nebla tasko, kiu ĝi ankoraŭ estas. Pli mallonge, Esperanto povas multege kontribui al la instruado de fremdaj lingvoj. Se okazus, ke iu ne sukcese lernas la facilan lingvon Esperanto, li sciis, en malgranda tempo, ke li probable ne kapablas lerni fremdan lingvon kiel lernejan studobjekton. Krome, ĉar studanto de Esperanto ofte lernas kiel gramatiko funkcias, li povos pli bone uzi la anglan lingvon--do la duonjaro de Esperanto ne estos malŝparo de tempo. Alivorte, ĉu lernanto poste studos alian fremdan lingvon, ĉu ne, li havos valoregan lernosperton.

Kolegoj, vi povas nun kompreni kial ni devas enkonduki Esperanton en la lernejojn. Dum miaj paroladoj pri Esperanto en pluraj lernejoj, mi diskutis la aferon kun instruistoj kaj fakestroj--miaj ideoj, kun efika aplikado, pravas. Kompreneble, tamen, tiuj personoj, same kiel ĉiuj aliaj, ofte rezistas ŝanĝon ĉar ili ne deziras pli da laboro. Ili respondas nur ripetitajn petojn. Do por enkonduki Esperanton en niajn lernejojn, oni devas petadi al sia loka lerneja administrantaro. Aliaj grupoj komencigis kursojn pri la hebrea, rusa, ĉina kaj svahila lingvoj per samspeca agado. Tial mi emfazas: se vi vere deziras helpi kaj la progreson de Esperanto kaj la lernantojn, ni komencu klopodi en la lernejoj!

Pola Esperanto-Teatro venas!

Sub patroneco de Universitato Fort Lauderdale, kiu prave sin nomas "la Internacia Universitato", vizitas Usonon du elstaraj esperantistaj geaktoroj el Polujo, s-ro Zbigniew Dobrzynski kaj lia ĉarma kaj talenta edzino Kalina Pienkiewicz. Ili veturos tra Usono kaj Kanado ĝis la 31a de julio, reprezentante la Polan Esperanto-Teatron, filion de la Pola Esperanto-Asocio.

S-ro Dobrzynski estas tre konata en sia lando, ĉefrolulo en pli ol tridek filmoj. Ambaŭ geaktoroj profesie ludas ĉe teatro, televido kaj radio jam dek ses jarojn.

Dum sia vizito al Nordameriko ili intencas ludi la komedion Proksima Nekonato de Aleksander Scibor-Rylski por kiel eble plej multe da Esperanto-societoj. Ili ankaŭ volonte prezentos ĝin pollingve al kluboj de poldevenaj usonanoj. Granda scenejo ne necesos; eĉ iom ampleksa salono sufiĉos.

Ni danku ĉion-ĉi al la prezidanto de Universitato Fort Lauderdale, d-ro S. J. Drake. Dank' al lia iniciato la universitato kovros grandan parton de la vojaĝelspezoj de ges-roj Dobrzynski. Esperantistoj povas helpi tiurilate per du metodoj: ili loĝigu ges-rojn Dobrzynski en siaj hejmoj (kia ŝanco por praktiki konversaciadon!) kaj/aŭ faru modestan mondonacon al "Fort Lauderdale University". (Tio estus neimpostebbla!)

Ni menciu, ke tiu, kiu kontribuas cent dolarojn aŭ pli al la universitato fariĝas per tio Esperanto-Fratulo ("Esperanto Fellow"). Ĝis nun prenis al si tiun havindan titolon s-ro Allan H. Boyle, s-ro Raymond R. Neri, d-ro Lehman Wendell, ges-roj Albert Estling kaj s-ro Glenn P. Turner.

De la 2a ĝis la 20a de julio ges-roj Dobrzynski helpos al d-ro John Lewine en supera konversacia kurso de Esperanto ĉe la universitato.

D-ro Drake invitas, ke oni lin telefonu (senkoste) per la numero 1-800-327-9636, por aranĝi viziton de la geaktoroj al la loka klubo esperantista. Oni kompreneble ne faru tion facilanime. Prefere la estraro unue interkonsiliĝu kaj eventuale aranĝu loĝigon. Oni memoru ankaŭ kontakti la lokan pol-usonan societeton.

Recenzas karl pov

Al Toronto, Stellan Engholm. Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhøj, 1972. 95p. \$1.95 ĉe Esperanto Book Service, P. O. Box 508, Hillsborough, CA 94010.

Jen denove haveblas la debuta verko de eble la plej elstara prozisto de nia literaturo originala. Ĝi estas longeta novelo pri dolĉamara amo inter gejunula paro. Kliŝa temo, ĉu ne? Sed kia diferenco inter tio ĉi kaj--ekzemple--Printempo en la aŭtuno de Baghy. Engholm scias sin regi; li ne permesas, ke la patoso siropiĝu.

La ĉefrolulo, Karlo, estas kamparano, timema ĉe la dancoj en la popola parko de la urbo Toronto, ĉar ja ne eblas al li dande sin vesti kiel la aliaj. Li heziteme sukcesas alproksimiĝi al Enjo, kurioza fraŭlino, kiu diras, ke kvankam li fakte plaĉas al ŝi, tamen estus pli bone, se ili ne plu renkontiĝus. Ĉu nura ineca kapricio? Karlo ne certas.

Finfine la sekreto malkaŝiĝas. Okazis malfeliĉo, hontinda malfeliĉo al Enjo. La du disiĝas. Karlo foriras por fari sian militservon, fariĝas politike konscia, dume pripensas sian sintenon al Enjo. Ĉu vere estis tiel hontinda afero, kiu okazis al ŝi? Aŭ eble nur ĉiutageca tragedieto?

Kiel debuta verko, ĝi estas fakte la plej malforta de Engholm, sed tio ne signifas, ke ĝi estas preterpasinda. Precipe nun, kiam la tuta serio "Infanoj en Toronto" ankaŭ denove haveblas, ĉiu vera literaturamanto volos posedi ĉi tiun ĝian preludon.

Konservajoj

--Danielo Kolker

Jen mia edzinjo konservas.
 Ŝi ege pri tio ĉi vervas,
 Konservas ŝi pirojn kaj pomojn
 Kaj ankaŭ diversajn legomojn--
 Paprikon, brasikon, tomaton
 Kaj ian ne-tute-konaton.
 Dum bolas ĝi en kaserol',
 Audiĝas senĉesa parol':
 "Mi diras al vi sen troaĵo,
 Ke vintre ĝi estos TROVAJO,
 Se tien mikroboj ne trafos,
 Se l' vazojn nenio dispafo."

Jen mia edzino konservas.
 Ŝi ege pri tio ĉi vervas.
 Enŝovas ŝi la konservaĵojn
 En vazojn, en vazojn, en vazojn,
 Kaj poste esploras kritike:
 Ĉu bone? Ĉu jam hermetike?
 Por ke botelego kaj vazo kaj pot'
 Staradu ĝis maj'--sen eksplod'.
 Ho ĉiam viciĝu sen ĉeso, sen fin',
 Vazaroj, boteloj, karafoj.
 Kaj ĉie minacu al ĉies edzin!
 Nur tiaj eksplodoj kaj pafoj!

Lastmomente...

Ĉefdelegito Armin F. Doneis kontente raportas, ke la UEA-kotizo por usonanoj restos sama, spite la lastatempan dolar-doloron. (Notu bone: la kongreskotizoj ja sanĝiĝis. Aktualajn aliĝkotizojn trovu aliloke en ĉi tiu numero.) Ĉu vi ankoraŭ ne (re)kotizis? Por aliĝa formularo skribu al s-ro Doneis ĉe P. O. Box 105, Pharr, TX 78577.

K-do Brian McClafferty atentigas, ke la adreso de la 46a SAT-Kongreso aperis malĝuste en la februara Newsletter. La ĝusta adreso estas SAT-Kongreso LK, P. O. Box 246 Station F, Toronto 5 ONT, Kanado.

Ĉu vi scias, ke ekzistas sonbenda servo de ELNA? Oni povas prunti de ĝi iujn el la 156 enlistigitajn programojn por tridek tagoj kontraŭ po \$1.00, inkluzive de afranko. Kaj bobenaj kaj kasetaj bendoj estas je via dispono. Skribu al la ELNA Aud-Vida Sekcio, H. Ken Ver Ploeg, Spokane, WA 99203.

Finfine, verŝajne vi rimarkis, ke ĉi tiun februaran numeron, kiu devus esti januara, vi ricevis eĉ ne en februaro. Kulpas ambaŭ anoj de la redakcio. Ni petas vian pardonon, kaj promesas, ke ni provos pliakuratiĝi estonte.

ELNA-Bulteno

731 Birmingham Road
 Burbank, CA 91504
 U. S. A./Usono

BULK RATE
U. S. POSTAGE
PAID
GLENDALÉ, CALIF.
PERMIT #575